Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2018 | n-ro 09-10 (1359-1360)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ĉu oni povas kalkuli je la popolo?



Al la rimarko, ke laboristoj ne nepre estas progresemaj, nek konsciaj pri sia sorto, rolo kaj povo, ne nur la analizoj montrantaj la ĉiaman (kaj eĉ pli evidentan kaj drastan nuntempe!) trafecon de la koncepto **klasbatalo**, ankaŭ poetoj povas ion respondi, en sia lingvo. Jen Francis Combes:

## Ĉu oni povas kalkuli je la popolo?

Ĉu oni povas fidi la popolon?
Plej ofte ĝi zorgas pri siaj mastrumaĵoj,
sed ne mastrumas siajn zorgotaĵojn,
kaj lasas sin regi
de tiuj, kiuj ĝin superregas.
La tutan ekonomion funkciigas ĝi,
sed ĝi komprenas nenion, ĝi diras, pri ekonomio;
ĝi estas la plej multa,
sed ĝi ne prikalkulatas;
ĝi estas la plej forta,
sed ĝia forto neniel utilas al ĝi.
Kiom ofte ĝi perfidis la esperojn
de tiuj, kiuj kredis je ĝi,
ĉar ĝi mem
ne kredis je si.
Al ĝi multe plaĉas kritiki tiujn, kiuj staras supre,
sed ĝenerale ĝi restas malsupre;
ĝi ne ŝatas la povon,
kaj cetere ĝi ne kaptas ĝin.
La popolo, kiel bone sciatas, memoron ne havas,
ĝi estas ŝanĝiĝema, facilanima
kaj zorgas nur pri amuziĝo.
Kiel povas vi en tiaj kondiĉoj
kalkuli kun la popolo?
La respondo facilas:
nur kun ĝi
vi povas kalkuli.

Francis Combes
*Esperantigis: R. Platteau*

Ĉi tiu poemo aperis en la libro *En la lumoj de la ekmiroj*, eldonita de MAS

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la septembro-oktobra numero de Sennaciulo, kun diversaj raportoj pri la 91a SAT-kongreso kaj unuaj praktikaj informoj pri la 92a, okazonta en Barcelono. Kun tiu ĉi numero estas senditaj du suplementoj: aliĝilo por la kongreso en Barcelono, kaj Sennacieca Revuo. Denove ni sukcesis reveni al 36-paĝa amplekso, sed plu frontas gravajn problemojn rilate al la ekspedo de la gazeto. Malgraŭ ripetaj atentigoj, la presisto denove uzis malnovan adresliston, en kiu mankas ĉiuj ĝisdatigoj de la pasinta jaro. Aldona komunikad-problemo kun la liveranto de kromekzempleroj kaŭzis plian malfruon en la reekspedo de la gazeto al nericevintoj.

Aliflanke, de antaŭ du jaroj ni sendas al ĉiuj ricevantoj de la surpapera versio, ankaŭ perretan version de la revuo. Se vi ne ricevas ĝin, sciigu al la redaktejo (sennaciulo.redaktejo@gmail.com) vian validan retadreson.

Vi vidos, ke dum la kongreso en Kragujevac estis multaj diskutoj pri modernaj komunikiloj kaj ilia ebla rolo por pliriĉigo de la asocia vivo. Tiuokaze indas atentigi, ke tiuj novaj rimedoj povas utili por kompletigi, kaj ne anstataŭi tiujn, kiuj jam pruvis sian daŭran efikecon. Interalie, Sennaciulo plu restas la ĉefa komunikilo inter ĉiuj membroj ekster la kongrestempo, do ne hezitu uzi ĝin por esprimi vin!

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

### Kovrila bildo

Revolucia agado en Barcelono - Popolanoj kunligas izoligajn sidlokojn truditajn de la lokaj aŭtoritatoj.

Foto farita de Pedro Sanz

## Enhavo

Enhavo


**Raportoj pri la 91a SAT-kongreso**

4 Gvidrezolucio de la 91a SAT-kongreso
4 Deklaracio de la 91a SAT-kongreso
5 SAT-anoj ekfrontas la defion de novaj komunikaj teknologioj
7 Portretateliero gvidata de kamarado HO Song
8 Resumo pri kongresaj laborkunsidoj
10 Kunveno de la liberecana frakcio

**Tra la Mondo - Azio**

12 Teĥnika revolucio, geopolitika ŝanceliĝo – Elektroaŭto, orpluvo por Ĉinujo
15 Tombejo de japanaj kaptitoj en Ulaanbaatar
17 Rilato inter Japanio kaj Mongolio

**Tra la Mondo - Eŭropo**

20 Kataluna gambito
22 “Por multaj, la pintkunveno de la G20 en Hamburgo estis provokado”
23 Chemnitz: koncerto kontraŭ “la malamo”

**Tra la Mondo - Afriko**

23 Jemeno: Novaj aerbombardoj mortigas 26 infanojn

**Tra la Mondo - Ameriko**

24 Brazilo: Pluraj kampadejoj de venezuelaj migrantoj atakitaj

**Sindikatismo tutmonda**

25 Ĉina registaro subpremas laboristojn kaj studentojn
25 Irano: liberigu Mohammed Habibi
26 Norvegio: Sekkingstad kaj Sund, ĉesigu la detruadon de la sindikato!
26 Rusio: Kontraŭ-sindikataj agadoj ĉe la Instituto de fiziko kaj teknologio de Moskvo
26 Dankon al ĉiuj!

**Medio**

27 Aliokaze estos jam malfrue!
27 Apokalipsa horloĝo atentigas pri homperereo

**Beletro**

2 Ĉu oni povas kalkuli je la popolo?
30 Zabolockij
36 Poemoj de Zabolockij

**Tra Esperantio**

30 Rezolucio de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto

**El la leterkesto**

31 Reage

**Nekrologo**

32 Louisette LEVREAUD

**92-a SAT-Kongreso**

34 Bonvenon en Barcelono por kongresi kun SAT!

**El la SAT-Administrejo**

30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:* ***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***